

# FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE FLANDRA

## ESPERANTO

### MOVADO



*\* N.B.L.M. \* (Nederlandse Esperantistebond)  
Flandra Esperantista Ligo  
Ejo \* Breughel \*  
Des Jacqueminian, 37, Brussel (Belg.)*

Officieel Orgaan  
van den

# Vlaamschen Esperantisten - Bond



Administranto: A. De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Kun membreco al « Flandra Ligo Esperantista »: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj.

# Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

## EL LA PREZARO:

En okcidento nenio nova — Remarque	Fr. 55,—	bind
La Viro el Francujo — Ivans	29,—	»
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Ŝi — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol. 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallieter — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Bækelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
La Juno Vivo (1934-1935)	15,—	»
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,—	»
Anni kaj Montmartre — R. Schwartz	18,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Nieuw Leerboek (geïllustreerd)	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Jubileumboek (Fed. Arbeiders Esperantisten)	10,—	»
Blinda Rozo — H. Conscience	4,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schidlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n <sup>o</sup> 1)	10,—	»

**INSIGNOJ:** Malgranda verda stelo: 2.00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.

Flandra kaj Esperanta flagetoj: 5,— fr.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

# Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista  
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:  
A. Pittoors  
Ten Eeckhovelei, 125  
Deurne-Noord  
Antwerpen



Administranto:  
Adolf De Keyzer  
P. van Humbeekstr., 3  
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj  
Kun membreco al F.L.E.: 25 fr.  
Eksterlando: 6 belgoj  
Poŝtĉeko: 2321.50 de F.L.E. Brussel.

#N.E.L.E.\* (Nia Estas La Estonteco)

Flandra Esperantista Grupo

Ejo \* Breughel \*

Am. Jacquemainlaan, 37, Brussel (Belg.)

**BONVOLU ATENTI!! NEPRE NOTU!**

Depost la 1<sup>a</sup> de Februaro la redaktadon de "Flandra Esperantisto" transprenos Sinjoro A. PITTOORS.

Ĉiujn artikolojn, komunikojn, korespondadon, recenzotajn librojn, interesanĝnumerojn, sendu estonte al la Redaktoro:

A. PITTOORS. Ten Eeckhove lei, 125, Deurne-Noord, Antwerpen. Por mankantaj aŭ nericevitaj kaj ankaŭ pour adresanĝoj, turnu vin al Sinjoro A. DE KEYSER, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.

LA REDAKTORO.

# Esperanto in de Praktijk.

## AUSTRALIE.

In den Senaat werd bij groote meerderheid van stemmen, een voorstel aangenomen strekkend tot het invoeren eener internationale taal in het onderwijs. Besloten werd het vraagstuk voor de volkenbond te brengen.

## BELGIE.

Het dagblad « De Dag » welke te Antwerpen verschijnt, begon met de publicatie van een wekelijksche, geïllustreerde Esperanto-rubriek.

Door de inrichtingscommissie der Brusselsche jaarbeurs werd besloten voortaan Esperanto te gebruiken; eertsdaags verschijnt propagandamateriaal met tekst in de internationale taal.

## BRAZILIE.

Ter gelegenheid van het 9-de Braziliaansch Esperanto-congres, werden postzegels uitgegeven met aanduidingen in Esperanto.

Van de Staatspersen verscheen een prachtig, geïllustreerd gidsboek in Esperanto nopens de Braziliaansche hoofdstad Rio-de-Janeiro.

## DENEMARKEN.

Bij ministerieel besluit werd de toelating verleend Esperanto op het leerplan te plaatsen in de vakscholen. Denemarken telt 300 dergelijke onderwijsinrichtingen.

## FRANKRIJK.

Reeds vele jaren gebruikt de jaarbeurs van Lyon de internationale taal. Aanplakbiljetten, vloeipapiër en prospecti met Esperanto-tekst vestigen onze aandacht op de « Internacia Foiro », die van 4 tot 14 Maart 1937 gehouden wordt. Alle Esperanto-uitgaven zijn gratis verkrijgbaar bij: Foire de Lyon, Esperanto-fako, rue Ménestrier, Lyon.

De internationale handelsbeurs van Marseille maakt insgelijks gebruik van Esperanto. Aanplakbiljetten, met tekst in de internationale taal, werden uitgegeven.

Ter gelegenheid der tentoonstelling van Parijs zal een conferentie gehouden worden over « Het Esperanto in het moderne leven ». Door mijnheer Albert Lebrun, president der Fransche Republiek, zal verneemde conferentie gepatronneerd worden, het voorzitterschap zal worden waargenomen door den heer André Baudet, voorzitter der handelskamer van Parijs en gewezen commissaris van het Fransch gouvernement bij de Brusselsche Wereldtentoonstelling. Als ondervoorzitters fungeren de heeren Ernest Archdéacon, gekend luchtvaartpionnier, generaal Louis Bastien en Jean Couteaux, algemeen directeur der Parijzer hospitalen.

Het radiostation Bordeaux-Lafayette zal voortaan ook Esperanto gebruiken in de uitzendingen.

Een groot aantal gunstige antwoorden werd door de universitaire Esperanto-vereeniging van Lyon ontvangen, op de vragenlijst door haar aan al de parlamentsleden gestuurd, betreffend het eventueele invoeren van Esperanto in het onderwijs.

## NEDERLAND.

De Federatie van arbeiders-Esperantisten in het gebied van de Nederlandsche taal telt nu 4.586 leden w. o. 171 in Vlaanderen. In 1936 werden door deze vereeniging 100 propaganda-tentoonstellingen alsook 362 cursussen met 5.600 deelnemers ingericht. Hierin zijn de kindercursussen begrepen die, ten getalle van 52, 'n duizental jeugdige belangstellenden vonden (door de zorgen der Federatie verschijnt een kinderkrant in een oplaag van 1.000 ex.). Het jubileumcongres dezer vereeniging werd in 1936 te 's Gravenhage gehouden en telde 1.250 deelnemers; het 22-ste Federatiecongres gaat door op Paschen 1937 te Gent.

## Esperanto in het Onderwijs

Het invoeren van Esperanto in de scholen is een der hoofdbetrachtingen van de Esperanto-beweging. Een verheugend feit mag het dan ook heeten, dat de Esperanto-organisaties doorgaans zoo'n groot aantal leden tellen, die tot het onderwijspersoneel behooren. Ook hier komt de Vlaamsche Esperantisten-Bond niet achteraan, en ware het mogelijk hieromtrent cijfers te noemen, dan kwamen we wellicht tot de ontdekking eener overgrootte verhouding.

Op internationaal gebied bezitten we een puike organisatie die de onderwijzers-Esperantisten groepeerd, en reeds verdienstelijk werk verrichtte, nl. « Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj » verkort: TAGE.

In 1922 werd een eerste stap gewaagd. Op uitnoodiging van den Volkenbond, had van 18 tot 20 April te Genève een conferentie plaats, waaraan door 96 paedagogen uit 28 landen werd deelgenomen en waarbij de regeeringen van 16 mogendheden zich lieten vertegenwoordigen. Het doel van deze conferentie was gegevens te verzamelen in verband met de invoering van Esperanto in de scholen. Deze gegevens zijn verzameld in een manifest, gericht « Tot de onderwijzers over de geheele wereld ». Wij ontleenen er het volgende aan :

« ... Wij zijn van meening dat het Esperanto volkomen geschikt is voor het practisch gebruik als internationale taal, voor alle doeleinden en op alle gebied. Esperanto beantwoordt ten volle van alle eischen welke aan een taal kunnen gesteld worden. Wegens zijne welluidendheid en logica bezit het belangrijke eigenschappen die de waarde ervan als opvoedingsmiddel vaststellen... »

Uit het onderzoek, ingesteld in uitvoering van de opdracht van de tweede zitting van den Volkenbond omtrent « Esperanto als internationale hulptaal, volgt o. a. :

« Esperanto is geschikt de rol te vervullen van internationale hulptaal; een overvloedig gebruik zoowel schriftelijk als mondeling, gaf haar de eigenschappen eener levende, uiterst lenige taal, die reeds uitgroeide en in staat is nog voortdurend te worden verrijkt. »

Die conferentie bracht ons een stap vooruit in de goede richting. Ongelukkig bleef het bij deze voor Esperanto vleierende beoordeeling; practische gevolgen bleven uit.

In de Esperanto-middens is men de meening toegedaan, dat nu het oogenblik gunstig is om het vraagstuk terug op te werpen. De verlenging van de leerplicht in de voornaamste landen van Europa heeft inderdaad nieuwe mogelijkheden in het leven geroepen. De twee bijkomende schooljaren bieden onbetwistbaar de mogelijkheid het Esperanto op de lesrooster te plaatsen. Twee uren per week gedurende de twee laatste studie jaren van het lager onderwijs zijn voldoende om degelijke Esperantisten te vormen. Schriftelijke betrekkingen of het uitwisselen van scholieren met de buurlanden zouden er aardig toe bijdragen om de geestelijke horizon der komende generaties te verruimen.

Onderwijl blijft het de taak der georganiseerde Esperanto-beweging, de internationale taal zooveel mogelijk te verspreiden onder het onderwijspersoneel, ten einde voortdurend door het aanwezig zijn eener kern bekwame leerkrachten in eventueele noodwendigheden te kunnen voorzien.

E. CORTVRIENDT.

## Loveno tra la jarcentoj

Ĉiu el ni memoras tiujn terurajn homojn, pri kies krueleco, dum niaj infanaj jaroj, ni ĉiam timis dum la naci-historia leciono, kies nomon oni menciis en la litanioj de Ĉiuj Sanktuloj, flanke de la pesto, la milito kaj la malsatego... la *Normanoj* !

Okazis dum la 9a jarcento. Laŭ la riveroj tiuj barbaroj enboatveturis la landojn, rabante, mortigante... Sed ankaŭ tiuj « napoleonaj » militistoj renkontis ilian Waterloo. Sed tiu Waterloo sin trovis ĉe la bordo de la Dejlo-rivero, tie kie poste naskiĝis *Leuven*. (Antaŭe « Loven », kio signifas : LOO : kampo arbara. VEN : Marĉo. — Komparu tiun nomon kun tiu de la nord-nederlanda urbo Venlo : Ven-loo., kiu verŝajne havas saman signifon).

Estis Arnoldo de Korintio, kiu forpelis la malamikojn en la jaro 891 kaj por havi daŭran remparon, li konstruis kastelon sur la monto, kiu ankaŭ estas nomata « Cesarsberg » aŭ « Keizersberg » (Cesaronto, aŭ monto de Cesaro, de la imperiestro).

La dua kerno, kiu formis Lovendon, estis la preĝejo de Sankta Petro. Tiuj kiuj loĝis cirkaŭ tiu centro estis nomataj « Petermannen » (Viroj de Petro), sed poste kaj ankoraŭ nuntempe oni nomas ĉiujn Lovenanojn per tiu nomo.

Precipe sekve de la invado de la Normanoj la antikva reĝlando de Lotaringo prezentis veran anarĥian bildon, tamen intertempe regionaj dinastioj sin formis, kaj ekludis gravan rolon en la landa historio. En 1106 estis Godfrido kun la Barbo, kiu akiris la titolon de Duko de Lotaringo. Li kunigis la regionojn de la hodiaŭaj belgaj provincoj Antwerpen kaj Brabanto kun lia heredlando la duklando de Leuven. Poste li etendigis sian regnon ĝis la malalta Mozo, kaj tiamaniere kun la nuna holanda provinco Noord-Brabant, li formis unu el la Dek-Sep Provincoj « Brabanto ».

Estis do Godfrido kun la Barbo, kiu estis la unua duko de Brabanto (Sajnis ke li ĵuris ne razi sian barbon, antaŭ ol havi la tito-

Ion de Duko de Lotaringo. Sed kompreneble la titolon ne sufiĉis, ankaŭ la regionojn mem li ege deziris kaj akiris... laŭ la kutima « humana » maniero... En tiu tempo Leuven estis do la ĉefurbo de duklando Brabanto...

En la XIIIa jarcento la Flandraj Urboj rapide kreskis kaj estas certe ke jam en 1149 Leuven havis urbajn remparojn, de kiu ĉiam restas ion videblan en la nuna urba parko.

Precipe de la dukoj Hendriko I kaj II de Brabanto, la urbo ricevis ĉiuspecajn rajtojn, skabenbenkon, urban juĝistaron kaj urbestron, kiu regis la urbon en la nomo de la Lovena grafo.



LOVENO : Preĝejo Sankta Miĥaelo

Ekonomia vivo ekfloris. La urbo iĝis centro de vigla drapindustrio, kaj la popolnombro eĉ atingis 100.000 animojn. Kaj en la XIIIa jarcento Loveno certe estis unu el la plej luksaj urboj de la Nederlandoj. Intertempe ni ankaŭ notu ke en 1316 la pesto mortigis la du trionojn de la enloĝantaro, kaj en 1326 forbrulis 600 domojn.

Sed ankaŭ ĉi-tie la egoismo, la aroganteco de la Nobeluloj, de la Patricianoj, kiuj regis en la oficialaj oficioj, ekmovis tuj la sociajn batalojn. La spirito pri libereco kaj justeco, la batalo kontraŭ la klasa egoismo, kiu tiel vigle leviĝis en ĉiuj flandraj urboj, ankaŭ ekestis inter la kuraĝaj laboristoj, metiistoj kaj burĝoj de nia Dejlorurbo. La venko de la Flandroj en Kortrijk en 1302 pliakrigris la for-

ton de la popola spirito. Ili postulis rajtojn, kunregadon en la urbaj aferoj kaj havi reprezentantojn en la konsilantaro de Kortenberg. Tiel en 1312 ekestis la « Chartel » de Kortenberg, kiu poste formis la « Blijde Inkomst » (Gaja Eniro), kiu estis kvazaŭ la konstitucio de Brabanto.

Por akiri la kunregadon de la urbo, Pieter Coutereel (kvankam Nobelulo) pro justeca emo, gvidis la burĝojn kaj perarme ili ekokupis la urbdomon.

Tiam Wenceslao dekretis ke tri el la sep skabenoj kaj 11 el la 22 konsilantoj estus elektitaj el la burĝoj.

Sed siaflanke la nobeluloj defendis siajn privilegiojn. Por povi militi la duko bezonis monon kaj per mono la nobeluloj aĉetis denove la « rajtojn » de ilia klaso.

Novaj revoluciaj agadoj ekestis en 1379. La gildoj armitaj envadis denove la urbdomon kaj forjetis tiujn nobelulojn, (kiuj ne jam forkuris), tra la fenestroj, mortigitaj.

Terure estis la venĝo de Wenceslao. La ĉefoj estis mortigitaj aŭ ekzilitaj. Inter ili ankaŭ la « meier » urbestro *Pieter Coutereel*, kiu je iu momento estis la vera mastro de la urbo kaj de la duklando. Pezaj monpunoj trafis la metiojn, 50.000 burĝoj transloĝiĝis, multaj eĉ al Anglujo, kaj la drapindustrio eniris periodon de fina dekadenco. Nun ni atingas la Burgondian Periodon, dum kiu Leuven denove konis nomon en la mondo. Sed la antaŭa ekonomia florado ne revenis. La famo ja estis de alia deveno; ĝi apartenis precipe al la tereno de la spirito. Vi komprenas, ke ni aludas la ekstarigon de Universitato sub la regno de Jan IV, duko de Burgondio.

La historio de tiu universitato tamen meritas specialan atenton, kaj en alia artikolo ni speciale pritraktos tiujn glorajn pagojn el la urbhistorio de Leuven. Mondfamaj nomoj kiel Erasmo, Justo Lipsio sufiĉas eĉ por ke ĝi ne restu nerimarkita.

De tiu momento la historio de la urbo iom post iom malheliĝas en la ĝenerala historio de la sin formantaj ŝtatoj kaj nacioj. La Burgondia ŝtato starigis la kortegon en Brussel, kiu tamen fakte iĝis ĉefurbo de Brabanto kaj de la Sudaj Nederlandoj. Dum tiu tempo la multaj turniroj kaj sekvantaroj (ommegangen) okaze de vizitoj de reĝoj k. t. p. donis al la nobeluloj kaj burĝoj la okazon elmontri la plej frenezajn luksojn kaj pompon. Tamen la artoj reviviĝis. Mateo de Layens konstruis la belegan urbdomon; Sulpicio Van der Vorst la preĝejon de Sankta Petro; Jan Van Ruysbroeck la Turon de Sta Gertrudo. Tiuj kaj aliaj konstruaĵoj estis ornamitaj per artaĵoj de famaj pentristoj kaj skulptistoj kiel Dirk Bouts, Rogier Van der Weyden, Kwinten Metsys, Willem Coxie kaj Roelof Van Velpen.

Novaj disputoj ekestis inter Mario de Burgondio (filino de Karolo La Maltimulo), kiu venis loĝi en Leuven, kaj la Urbanoj, kiuj postulis politikajn rajtojn. Oni subskribis packontrakton je Danebruck en 1489.

La regado de Filipo la Bela (1494-1596) kaj de Karolo V ne havis politikajn sekvojn por Leuven. Kiam la Nederlandoj ekribelis kontraŭ Filipo, la urbo, sendube sub la katolika impulso de la Universitato kontraŭstaris la Princon de Oranĝo, la liberiganto de la Nederlandoj. Post la hispana regado, kiam Alberto kaj Isabela estris



la landon, (1598-1633) estis tamen en Leuven, ke ili juris la « Blyde Inkomste ». Justo Lipsio, tiutempe profesoro de la Universitato, okaze de vizito de la gereĝoj, intence pritraktis la temon : « La mildeco de la Regnestroj », kaj li faris tiel bonan, imponan impreson, ke amnestio estis proklamata por ĉiuj, kiuj ankoraŭ restis enkarcerigitaj pro la religia ribelado.

La 29a de Januaro 1759 estis inaŭgurata la kanalon de Leuven al Mechelen kaj la rivero Rupel, kiu donis novajn okazojn por komerca trafiko. Precipe la bierfarejoj floradis tiam. Nome 42, kiuj jare forsendis 130.000 barelojn...



*LOVENO: Granda Beginejo.*

Dato kiu laŭ folkloro vidpunkto ne povas esti forgesata estas la 19a de Januaro 1691, kiu baptis la Lovenanojn tra la jarcentoj kiel « Bovinpafilantoj ». Iun nokton la luno fantome flagris inter kelkaj bovinoj ekster la urbaj remparoj, kaj la gvardisto tuj alarmis la enloĝantaron, kredante ke la Francoj ĉirkaŭigis la urbon...

Ni ankaŭ mencias ke en 1786 Jozefo II (sub la aŭstria regado) fondis la ĝeneralan seminarion (por pastroj), pri kiu leviĝis tiom

da diskutoj. En 1789 la armeo de la Brabantaj patriotoj (Van der Meersch) triumfe enmarŝis la urbon, post la venko en Turnhout, kaj kompreneble la liberigo de la patrujo laŭte estis festita. Sed en 1791, jam revenis la Aŭstroj, tamen nur por unu jaro. En 1792 estis la Francaj Respublikanoj (Dumouriez), kiuj restis kiel ni scias ĝis en 1815.

Pri la regado de Vilhelmo I, post la unuiĝo de la Nederlandoj, profesoro Dro. Van der Essen atestis en radioparolado antaŭ la Brusela Mikrofono (13-9-36) « ke li faris ĉion eblan por donaci novan vivon al la komerco kaj industrio ». Tiam Leuven havis ŝtatan universitaton. En 1835 la katolika universitato, kiu estis forigita en 1797, denove funkciis regule, kaj alportis la modernan studentan vivon en la urbo. En 1914 Leuven ege suferis pro la germana invado. Pli ol 200 personoj estis mortigitaj kaj pli ol mil domoj forbrulitaj. Ankaŭ la fama universitata biblioteko kaj la belega Sta Petro-preĝejo.

Sed feliĉe nova urbo restariĝis kun pli moderna impresoj, kiu ege kontrastas kun la malnova parto. Sed tamen pro sentimentalaj kialoj la rekonstruado ne sufiĉe sin fleksis laŭ la modernaj necesajoj.

Kiel simbolo de la reviviĝo, de la nova tempo, de nova prospero, la nova universitata biblioteko, kiu pro redono de libroj el Germanujo kaj mildaj simpatiaj subtenoj el ĉiuj partoj de la mondo, denove enhavas pli ol unu miliono da libroj, fiere leviĝas sian turon.

La nomo de Leuven, la moderna Leuven pli ol iam belsonos tra la jarcentoj.

Pol VAN DER POEL.

## **Pri kriminala Juro**

### **LA RESPONDECA TEORIO EN LA MODERNA KRIMINALO JURO**

Por bone kompreni la tutan signifon kaj forton de la nova kriminala teorio, necesas ke mi prezentu al vi la malnovan.

Tiu malnova teorio honoras la principon de la respondeco, t. e. krimulo por esti punata devas esti respondeca pri la misago, kiun li faris. Tio ŝajnas eble al vi tute natura. Tamen se oni bone pripensas, oni tuj rimarkas ke tio estas ĝuste la vidpunkto de la moralalo. La moralalo nur pridemandas la intencon, la bonan volon, la respondecon. Tamen juro estas alia aĵo ol moralalo kaj oni spertis ke la juro malboniras kiam ĝi sekvas tro nuran moralan vidpunkton. Ankaŭ nia belga kriminala juro sin bazas sur tia moralala principo.

La nesufiĉeco de tiu sistemo sin montras precipe en niaj tempoj. La lastaj eltrovoj de la moderna psikologio, precipe en la psikoanaliza kampo (Freud) kaj la novaj vidoj, kiujn ekvidas medicinaj sciencoj kiel la psikopatio, la nevropatio, la antropologio klare montras ke la kaŭzoj, kiuj malliberigas la liberan homan volon, tiel kreskas laŭ nombro kaj laŭ nerezisteblo, ke la homa respondeco havas ĉiutage malpligrandigantan terenon.

Oni tuj komprenas la rebaton de tiuj sciigoj sur la jura teorio. Malpli da respondeco, malpli da puno. La advokatoj dankeme alrabis tiun ilon: ili deklaras nerespondecajn siajn klientojn kaj tiuj ĉi preskaŭ aŭtomate estas senkulpigataj, liberigataj, nepunataj. Eĉ kiam la advokatoj konsciencege plenumas sian taskon kaj laŭjure

demandas la liberigon de sia vere freneza, kaj do neresponda, kliento, ĉu oni tiam devas reliveri al la socia vivo homon frenezan tiel danĝere ke li iĝis krimulo? La statistikoj montras ke inter la recidivistoj troviĝas granda procento da mensmalsanuloj. Estante mensmalsanaj, ili estas nerespondaj, kaj estante nerespondaj, ili estas nepuneblaj. Oni do lasas liberan la plej danĝeran parton de la krimuloj, oni lasas nepunitan la plej gravan formon de la kriminaleco.

Tion komprenis la nova teorio, kaj vidante ke estis precipe la homa socio, kiu suferas pro la manko de la jura sistemo, ĝi unue kaj precipe volis garantii la socian sekurecon. Kiel kriterio de la punebleco ĝi ne plu metas la respondecon de la krimulo, sed lian socian danĝerecon.

Tiu nova teorio havas du grandajn profitojn: la danĝereco de ia homo estas multe pli facile konstatebla kaj mezurebla ol lia respondeco. Ĝi ja estas kunmetita de diversaj objektivaj elementoj: kiel la edukado, la intelekta stato, la socia kaj ekonomia medio k. t. p. ... Due la nova teorio multe pli efektive defendas la socion kontraŭ la plej timindaj formoj de la kriminaleco: nome la kriminaleco de la junuloj, de la abnormaluloj kaj de la recidivistoj.

Sed la teorio ankaŭ havas strangajn sekvojn kiam oni ĝin elpensas ĝisfunde.

Unue oni ne plu povas kondamni la krimulon al difinita puno. Oni ne plu povas juĝi ke li restu en malliberejo dum tri jaroj ekzemple, ĉar neniu povas antaŭdiri ke post 3 jaroj lia stato de danĝereco estos malaperinta. Oni devas malliberigi lin « ĝis kiam li ne plu estos danĝera ». Oni nomas tion kondamno al nedifinita puno. Tiu sistemo, plie, jam efektive ekzistas kaj ĉiutage funkcias en nia belga kriminala juro.

Plie oni ankaŭ konas en tiu sistemo la subkondiĉan liberigon. Oni do povas liberigi krimulon, pri kiu oni pensas ke li plibonigis, antaŭ ol ke la puno estas tute elĉerpita sed tiam nur sub la kondiĉo ke li ne agos mise, alie...

Kaj trie la plej stranga sekvo de tiu teorio. La stato de danĝereco estas, kiel mi diris, rekonebla al objektivaj elementoj; povas do esti ke tiuj samaj objektivaj elementoj jam ekzistas kaj estas konstateblaj antaŭ ol ke la danĝera individuo faris ian kriman agon. Oni do povas antaŭvidi la krimulecon kaj preni la necesajn antaŭzorgojn. La nova teorio do ebligas la fakton esti malliberigita antaŭ ol ke oni faris ian krimon.

Tio estas, mallonge klarigitaj, la grandaj fluoj en la moderna kriminala juro.

Edg. VERHEYDEN.

## **Esperanto kaj Bellamy**

Estas rimarkinda fakto ke ofte grandaj ideoj naskiĝas samtempe en la cerboj de homoj kiuj tute ne konas unu la alian kaj ofte loĝas en tre diversaj lokoj.

En la sama tempo kiam en Eŭropo Dro. Zamenhof publikigis sian lingvon kaj skribis pri la « interna ideo » de Esperanto, vivis en Ameriko Edward Bellamy kiu verkis libron enhavantan novan eko-

nomian sistemon, ankaŭ bazata sur humanismo; frateco kaj internaciismo kaj en kiu li eĉ profetas la uzon de mondlingvo.

En sia verko Bellamy donas al ni bildon de la socio en la jaro 2000-a, kiam ĉiuj anoj de la nacio havos la samajn rajtojn sed ankaŭ egalajn devojn ; kiam ne plu ekzistos senlaboreco, mizero, ekonomiaj krizoj ; kiam anstataŭe la granda teknika kaj scienca progreso pruviĝos esti beno, ebliganta al ĉiu vivon senzorgan.

La bazo de la Bellamy-sistemo estas la ekonomia egaleco de ĉiuj dum la tuta vivo.

La nuntempa evoluo de tekniko kaj scienco ebligas abunde provizi la tutan homaron je ĉiuj bezonaĵoj per minimuma laboro, sed la ekzistanta ekonomio, bazata sur konkurenco, profito, nepersona mono, nekontrolata produktado k. t. p., kaŭzas ke al milionoj da homoj mankas la necesaj vivrimedoj, dum aliflanke grandaj amaĵoj da varoj estas detruataj; ĉar ili estas nevendeblaj.

La ruinigaj konsekvencoj de la nuna sistemo povas malaperi nur se la produktado estas regulata laŭ la kolektiva bezono de la homaro, ĉiu ricevante egalan porcion kaj farante sian parton de la komuna laboro ; nur tiam povos komenci daŭra prospero por la tuta homaro.

Por disvastigi ĉi tiujn ekonomiajn ideojn fondiĝis la Internacia Asocio « Bellamy », kiu utiligas Esperanton por la Internacia propagando.

La I. A. B. estas neŭtrala rilate politikon kaj religion kaj ĝiaj anoj apartenas al ĉiuj klasoj de la popolo.

La suprenomita verko de Edward Bellamy baldaŭ aperos en Esperanto, sub la titolo « Rigardante Malantaŭen ».

En la konvinko ke ĉiu tago de prokrasto daŭrigas kaj pligrandigas la mizero de milionoj da homoj, la I. A. B. alvokas ĉiujn bonintencajn personojn al la propagando de la hela idealo.

Informojn kaj propagandan materialon volonte havigos la Centro por Internacia Propagando de la I. A. B., sekretario Gerard H. Bosma, Kerkweg, 152, Santpoort (Nederlando).

## **Alvoko.**

Niaj legantoj jam estis informitaj pri la regula ĉiusemajna presperanta rubriko en « De Dag ».

La multaj leteroj kiujn ni ricevis koncerne tiujn artikolojn, pravas, ke ni trovis la vojon al la publiko. Ni do daŭrigos nian laboron en tiu senĉo. Sed por ke tiuj artikoloj estu kiel eble plej interesaj, okulfrapantaj ni plibeligas ilin per fotografiaĵoj. Kaj jen la malagrablaĵo. Ni ne disponas pri sufiĉa kvanto da fotoj por daŭre uzi en la artikolserio. Tial ni petas la samideanojn, kiuj posedas fotografiaĵojn aŭ desegnaĵojn pri la ĉsp. movado dum tempe pruntedoni ilin al ni.

Plenigu do la leterkeston de : ESPERANTISME, de Bosschaertstraat, 272, Antwerpen.

## Als men verre reizen doet

dan kan men veel verhalen, heet het. En des te meer, als men daarbij Esperanto bezigt, zouden wij er aan willen toevoegen. Dat dit maar niet een propagandapraatje is, weten we als Esperantist heel wel. Dat men het overal zoo voelt, blijkt ons bijna dagelijks, dan uit het eene, dan uit het andere buitenlandsche Esperanto-orgaan.

Zoo schrijft iemand die jaren lang reeds reist, blijkbaar voor studiedoeleinden, in het orgaan van U. E. A. : « Laat men maar zeggen, dat Esperanto geen levende taal is, en geen praktisch nut heeft. Welk een vreugde heb ik er al niet van beleefd, steeds als ik uit de bergen kwam of van het platteland, waar ik de taal niet verstond die men sprak en plotseling in een stad kwam, waar ik dank zij ons adresboek, een samideano (iemand die Esperanto kent) ontmoette of een Esperanto-groep, zoodat er aan mijn doofstomheid een einde kwam. En dat vond nog al eens plaats, laatst nog in Kanton, Cangsa, Hankau, Peking in China, Seul op Korea in Ajabe en Kameoka in Japan. Er zullen er zijn, die zeggen, dat het Engelsch meer nut zou afwerpen, door er immers meer Engelsch dan Esperanto spreken. Edoch, ik ken Engelsch en gebruik het ook, maar toch zeg ik, dat het mij niet zoo veel hielp als Esperanto. Hoe zoo dan ? Welnu, ten eerste bestaat er geen adresboek van hen, die Engelsch kennen, zooals wel het geval is met Esperanto. Vindt men een adres van iemand die Engelsch kent, dan kan men hem zoo maar niet bezoeken. Ik voel daar niet veel voor, want veelal zal het een zakenman zijn of een ambtenaar die geen tijd voor mij heeft. Maar nu bezoek ik een Esperantist en ofschoon zijn geboorteplaats mogelijk tegenovergesteld is op aarde aan die van mij, en hij wellicht opgevoed is met principes en gewoonten geheel ongelijk aan de mijne, ondanks dat zal ik in hem een broeder vinden, bereid mij te helpen. Ongelegen, ik voel mij zelfs meer tot hem aangetrokken dan tot mijn eigen bloedverwanten, omdat ik kan verwachten, dat hij zich vrijgemaakt heeft van vooroordeelen als chauvinisme e. d. en hogere idealen koestert. Als nu na 25 jaren van reizen en trekken de heele wereld mijn vaderland is geworden, dan is het heele Esperantistendom meer speciaal mijn familie. Uit mijn ervaring zou ik veel kunnen mededeelen. Zoo in Peking, waar ik verplicht zou zijn geweest een duur Europeesch hotel te betrekken. Ik zocht de Esperanto-delegito op en door middel van een jong Esperantist kon ik een goedkope kamer krijgen naast de zijne in een net hotelletje, zoodat ik vijf weken kon blijven inplaats van enkele dagen. Dat ik door zijn toedoen veel zag, is wel te begrijpen. Zoo ook in Kameoka en in Tokio bewees men mij gedurende de zeven maanden verblijf vele diensten en kwam ik in kontakt met 'n bekwamen ethnoloog van de Luca-eilanden.

De opbloei van de Esperanto-beweging hier is alleszins bewonderenswaard. Men kan overal Esperantoboeken koopen. Ik zag een Esperantokursus met een zaal vol volk. En dat waren alleen de Chi-neesche studenten die in Tokio wonen. Een andere keer waren een paar honderd Esperantisten bijeen en dat was enkel spoorwegperso-

neel. Bij mijn aankomst alhier ontving ik een keurig uitgevoerd toeristenboekje van de spoorwegen in Esperanto. Hier vond ik het bewijs, dat de kennis van Esperanto werkelijk onmisbaar wordt en zoo zal dan ook het gemartel der vreemde-talen-studeerenden eindigen ».

Dit oordeel van den heer G. Marin, die de wereld kent en na Afrika en Indië bezocht te hebben, nu Azië doortrekt zal toch menig niet-Esperantist wel wat zeggen.

Naar L.E.

## Esperanto en Germanujo

Laŭ postulo de la polico la Esperantaj organizoj en Germanujo devis ĉesi la laboron. Tiu decido sendube rezultis el tio, ke en nia lando ekzistis du Esp.-organizoj kiuj penadiĝis atingi la gloron per tio ke unu kontraŭbatalis la alian. Unu el ambaŭ eĉ skribis, kiel oni raportis al ni, al diversaj policejoj kaj denunciis la alian, dirante ke tiu akceptis membrojn kiuj agis en kontraŭnacia senco. Tute nature la polico devis veni al la rezulto malpermesi la Esp.-organizojn. Kontraŭe la uzado de Esperanto, la portado de la verda stelo, aranĝo de kursoj, k. t. p. estas permesataj.

KEU ankaŭ estis devigata likvidiĝi. KEU decidis la likvidadon kaj samtempe protestis. Al la ĉefo de la polico en Berlin KEU sendis kopiojn de laŭdaj kaj aprobaj leteroj ricevitaĵ de ministeriejoj kaj aliaj oficialaj institucioj. La polico tute komprenis la gravecon de nia laboro kaj per dekreto de 7.9.1936 (Akto S-PP II A 1132/36) permesis

### *la daŭrigon de la laboro.*

Ni treege ĝojas pri tiu sukceso kaj kun vera plezuro ni hodiaŭ informas pri tio niajn eksterlandajn amikojn.

Ni esperas ke la samideanoj en la tuta mondo komprenu la gravecon de tiu sukceso. Ni ankaŭ esperas ke ĉiuj nun subtenu nin per ĉiuj fortoj ĉar ni tute nature nun devas montri per faktoj ke la decido de la polico estis prava. Do- amase helpu per jenaj kunlaboroj :

- 1) anonciĝu el ĉiu lando almenaŭ unu serioza laborema samideano por aranĝi KEU-Agentejon;
- 2) ĉiu varbu inter la komercistoj de sia ŭrbo por mendoj je varoj anoncitaĵ en « La Komercisto », au aliaj.
- 3) Aliĝu multnombre kiel subtenanto (kotizo libervola).
- 4) Ĉiu vendu la de ni eldonitajn Esp.-gramofondiskojn kun la arioj el Carmen kaj Rigoletto (po RM 2.50 afrankite).

Se ni povos montri al la ekonomia ministrejo peradojn de multegaj mendoj, oni ŝatos, priatentos kaj certe subtenos nin. Nur per tio ni povos reatingi la perditan teritorion en Germanujo. Estu certaj ke ni agos tute prudente kaj celkonscie. Tamen, la ĉefa afero estas la subteno per la eksterlandaj samideanoj en la maniero skizita.

Vivu KEU-laboro en ĉiuj landoj.

Dresden-*Radebeul*, Friedrich August Str. 4.

Komercista Esperanto Unio Unuiĝo por progresigo de ekonomiaj terrilatoj. Ranft direktanto.

# Diversaĵoj

## *Interkontinenta biciklado.*

Mirinda kaj unika vojaĝo, kiu daŭris du jarojn S-anoj Vincente Gregori Espasa kaj Victor Scaraffia el Argentino (du fervoraj Esperantistoj, ankaŭ skolt-« esploratoroj ») veturis per duhoma biciklo el Buenos Aires ĝis Washington (Usono) distancon de 22.000 kilometroj. Ili devis trovi aŭ fari vojon trans vastegajn montegojn, tra dezertoj, tra regionoj jen kulturitaj jen sovaĝaj, tra tropikaj arbaregoj, kaj (kie tiaj estas) per bonaj stratvojoj kiuj estos eroj de la proponita transamerika kaj internacia turista vojo. Dum la longa vojaĝado ili eluzis 29 pneŭmatikajn radringojn. Kaj ofte ili devis piediri, eĉ grimpante, kaj antaŭenpuŝi la veturilon.

Dum la vojaĝo ili vizitas la jenajn landojn : Argentino, Ĉilio, Peruo, Ekvadoro, Kolumbio, Panamo, Kosta-Riko, Nikaragvo, Salvadoro, Honduraso, Gvatemalo, Belizo, Meksiko, Usono.

Survoje, dum la trapaso de tiuj multaj landoj, ili elserĉis kaj salutis esperantistojn, kie ajn ili estas troveblaj.

Fine, la okan de septembro (1936) ili alvenis Washington'on, kie estis donata al ili entuziasmaj renkontsalutoj de diversaj societoj — biciklista, turista, esperantista. La argentina ambasadorejo bonvenigis ilin private. Kaj posttagmeze en la domo de la Tut-Amerika Unuiĝo (Pan-American Union) oni publike bonvenigis ilin kun radiodisvastigo. La ĉef-estro de la Tut-Amerika Unuiĝo disvastigis gratulojn angle kaj hispane ; kaj la vojaĝintoj disvastigis respondojn hispane, angle, Esperante. La radio-anoncisto zorge priskribis la vojaĝvestaron de la junuloj, kaj speciale menciis la grandan verdan stelon kun blanka « E » sur la brustoj, « la emblemo de Esperanto, la internacia lingvo ».

Poste tiuj entreprenemaj kaj kuraĝaj junuloj vizitos Novjorkon kaj aliajn urbojn de Usono. Finfine ili reveturos per komercaj transportiloj al sia hejmlando, portante kun si orajn memorojn nenombrelajn pri rimarkinda internacia aventuro.

*(Esperanto-Gazetservo de Usono).*

## *Een Esperanto naam voor een nieuwe vrucht .*

Aan een nieuw soort sinaasappel, dat verkregen werd uit eenige, toevallig gevonden zaden, heeft men den Esperanto-naam TROVITA (d. i. gevonden) gegeven. *De zaden bevonden zich in een exemplaar van een sinaasappelsoort, welke gewoonlijk zaadloos is. Volgens Dr Howard B. Forst van het station voor proeven op citroenvruchten, behorende bij de Californische universiteit, kan de TROVITA groeien en vruchtdragen in drogere streken dan die, welke de gewone zaadloze sinaasappelen noodig hebben.*

Dr Frost, die ook een bekend Esperantist is, gaf een beschrijving van drie nieuwe citroenvruchten; twee daarvan heeft men uit verschillende typen van mandarijn-sinaasappels verkregen ; de derde door kruising tusschen mandarijn- en satsum-sinaasappel.

Uit *La Estonto Estas Nia*, Esperanto Press Service Washington.

« Ligilo por Vidantoj ».

estas internacia gazeto esperantista, pri kies ekzisto nenion scias multaj esperantistoj. Kaj tamen ĝi valoras ĉies subtenon kaj simpatian, ne nur pro ĝia alta idealo, nome esti ligilo inter la vidantoj kaj iliaj nevidantaj gefratoj, sed ĉefe pro tio ke ĝi vere donas al sia leganto tutan valuton laŭ la pagita abonkotiĝo. La lastaperinta numero enhavas tre interesajn, eĉ riĉe ilustritajn, artikolojn, el kiuj nomi : Patrino de blinduloj, Reĝino Elisabeto de Rumanujo (Carmen Sylva) — Triumfo de paroĥestro blinda de naskiĝo, — Spertoj de blinda ĵurnalisto sur Sao Miguel, — Gvidhundoj, artikolo kiu kun plej granda lerteco sukcesos kapti ĉies intereson. Temas pri edukado de gvidhundoj por blinduloj, kaj la priskribo estas tiel viva kaj la ekzemploj donitaj tiel konvinkaj, ke oni post la legado ĝojas kun tiuj blinduloj, kiuj havis la feliĉon trovi tiel bonan kunvivanton kiel estas la gvidhundo.

Ni servas ne nur al la blindula afero se ni abonas la gazeton, ni trovos ĝojon pere de ĝi. La jarabonprezo estas nur 1 krono, kiun oni sendu al Red. Harald Thilander, Stocksund, Svedujo.

## Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

**ESPERANTO KALENDARO.** — Kun 28 interesaj bildoj koncernaj nian movadon. Eldonis J. Philip Kruseman, Den Haag. Havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto. Prezo 25 frankoj. La eldonanto ĝin nomas modesta komenco kaj provo, sed fakte estas produkto kiu honorigas Esperanton, kaj ĝia posedanto certe nur kordolore konsentos forŝiri folion post folio...

### NOVA LERNOLIBRO !

Post longa atendo fine aperis la nederlandlingva eldono de la lernolibro verkita de Dr Ferenc Szilagyi. Estas la plej bona lernolibro kiu ĝis nun aperis ; ekzistas nun eldonoj sveda, angla, dana, franca, kaj nederlanda. Ĝi enhavas grandan nombron da ilustraĵoj kaj tutan serion de la fame konate Adamson-bildoj. La libro konsistas el 16 lecionoj verkitaj laŭ la Cseh-metodo; post ĉiu leciono sekvas nederlandlingvaj klarigoj pri la gramatiko kaj je fino de la libro troviĝas la listo de la uzitaj vortoj.

La libro taŭgas por memstudo kaj por kursoj. La prezo estas 12 frankoj. La sekcioj kaj reprezentantoj de Flandra Ligo Esperantista ĝuas favorprezon je kvanta aĉeto. Ĝi estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto, Kortrijk.

\* \* \*

POR NIA REVUO

H. B. en R. . . . . Fr. 30,—



# Grupa Vivo

## ANTWERPEN — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Nia Kristnaskfesto okazis la 26an de Decembro en la festsalonego « Kathedraal ». La geamikoj kaj gesimpatiantoj de la grupo ĉeestis multnombre. La programo estis tre prizorgita. Kiel ĉiujare okazis lotumado por la infanoj senpage. La dua parto de la programo havis multan intereson, ankaŭ por la lotumado. La balo komencis noktmeze, je granda bedaŭro de ĉiuj. La festo bone sukcesis, ĉar nia festdirektoro, Sinjoro Volders, laboris senlace.

## BRUSSEL — N. E. L. E.

Nia kurso kontentige funkcias sub la lerta gvido de nia prezidanto S-ano G. Broodcoorens. La saman tagon kaj tuj post la kurso, kunvenis nia sekcio ; tiu aranĝo montrigis ideala ĉar la lernantoj ne forlasas la ejon sed partoprenas la grupan vivon.

Unuan listeton kun la nomoj de 5 anoj de nia sekcio ni jam forsendis al la organiza komitato de la 8-a Flandra kongreso en Leuven.

## RONSE — LA PACA STELO.

Nia grupo denove donis sian parton en la alaĉeto de libroj okaze de la librotago. Dekojn da libroj estis menditaj per individuoj kaj per la grupo por la biblioteko. La proksiman monaton ĉiu leganto de nia revuo povos legi la detalan raporton pri la ĝenerala kunveno kiu okazis in Januaro.

La aliĝoj al la kongreso jam sekvas en bona ordo kaj ni opinias atingi belan, bonan kaj amuzan nombron.

La grupa vivo marŝas ĉiam antaŭen kaj ĉiusemajne nia samideanaro estas en Concordia por habili, sin instrui, aŭ kanti, ĉiam en Esperanto.

Ni dankas ankaŭ ĉi-tie, nian Sekretarion S-ro Geenens M. kiu prizorgis dum tuta jaro, ĉiam interesan programon monatan.

Lastan alvokon ni faras, por pagigi la kotizaĵojn por 1937.

# La Angulo de la Serĉemuloj

Por ĉia problemo ni forlotos unu premion. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5e de Marto 1937, rekte al S-ro F. Volders, Bredastraat, 94, Antwerpen.

*Premioj.* — Ni ricevis premiojn de S-ro Pittoors. Koran dankon !


Problemo 14. — Gajnis premion Fraŭlino Van der Mast.

Problemo 15. — Gajnis premion Sinjoro K. Pollet.

Solve de Problemo 14. — *Hor.* Turgardisto — Infanterio — Geartisto — Bandestrar.

Solve de Problemo 15. — Eskorto — korto = ES. — Parolado — ar — ol — ad = P. — Ebon — bon = E. — Krampo — kampo = R. — Antipodo — tipo — do = AN. — Promontoro — pro — mon — oro = TO. — ESPERANTO.

PROBLEMO No 18 — 37 POENTOJ



*Horizontale :*

- 1) Bindajo por fotografaĵoj (R) — sin movi sur la ventro.
- 2) Iĝi intima kun iu.
- 3) Arbspeco (R) — movi ŝipon (R) veturilparto (R).
- 4) Imago, koncepto (R) adverbo (kaŭzo).
- 5) Religia memortago (R).
- 6) Treni (R) — dancfesto (R).
- 7) Kolekto (R) — altranga ekleziulo (R) — ludkarto (R).
- 8) Pastra laboro (R) — lokumi (R) — granda (R).

*Vertikale :*

- 1) Papago (R) — infano (R).
- 2) Fremda mono (R) — denove.
- 3) Rabisto (R).
- 4) Sufikso — Pesilo sen kapo (R).
- 5) Senti surprizon pri io (R) — skuadeti (R).
- 6) Medolo (R) — Prefikso.
- 7) Samsoneco de finaj silaboj (R) — Monaĥejestro (R).
- 8) Maldifinebla ĉe la helulinoj (R) — anagramo de satĉi.
- 9) Dia ago (R).
- 10) Malsama (R) — Prepozicio.
- 11) Meritanta ion (digna) (R) — severe konforma al la vero (R).

PROBLEMO No 19 — 5 POENTOJ

Dupiedulo mi estas,	En kafejo mi ne sidas,
Malfacile mi restas	En hotelo mi ne venas,
Por ĉiu mallerta lernanto	Kvankam la vinon mi tre ŝatas
Kiu komencas al Esperanto.	Kaj la fraŭlinojn adoradas.
Mi en ĉiu lernejo estas	En lumo mi ne brilas,
Kaj en ĉiu leciono restas,	En ombro mi ne sidas,
Kvankam mi neniam min movas	Sed la sunon mi ŝategas
Ĉar miaj kruroj al tio rifuzas.	Kaj en nokto ĉiam regas.
En ĉiu kunveno mi estas	Vane serĉu en la strato,
Kaj Kongreson mi ĉiam ĉeestas,	Ĉe la patro aŭ la frato,
Sed en batalo aŭ milito	Direktu vin al najbarin'
Mi ĉiam estas for kaŝito.	Ĉar dufoje mi vizitis ŝin.

KIU NUN EKKONAS MIN ?

---

**NE MALATENTU NIAN ALVOKON !!**

paĝo 122

---

## **FLANDRA LIGO ESPERANTISTA** **(Vlaamse Esperantisten - Bond)**

**Voorzitter:** H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.  
**Ondervoorzitter:** E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Sekretaris:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.  
**Penningmeester:** Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.  
**Propaganda:** Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme (O. Vl.).  
**Postchek:** Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr 2321.50.  
**Orgaan:** « Flandra Esperantisto », maandblad.  
**Lidmaatschap:** 5 fr.; met maandblad: 25 fr.

### **AFDEELINGEN:**

**Aalst:** « Pioniro ». Sekr.: Denderstr., 20.  
**Antwerpen:** « Flandrema Grupo Esp-ista ». Sekr.: Statiestraat, 156, Berchem.  
**Brussel:** « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.). Sekr.: P. Van Humbeekstr., 3.  
**Kortrijk:** « Esperantista Grupo ». Sekr.: Moeskroenstraat, 11.  
**Leuven:** « La Nova Tagiĝo ». Sekr.: Tienschestraat, 106.  
**Lichtervelde:** « La Tagiĝo ». Sekr.: Wetstr., 44.  
**Mechelen:** « La Estonto ». Sekr.: Vekestraat, 25.  
**Oostende:** « Ostenda Grupo Esperantista ». Sekr.: Oudenburgsche stwg., 8.  
**Roeselare:** « Ruselara Esperantista Grupo ». Statedreef, 177.  
**Saventhem:** « Verda Standardo ». Sekr.: Heldenplaats, 115.  
**Tienen:** « Zamenhofa Standardo ». Sekr. Bruulstraat, Kumptich.

### **VERTEGENWOORDIGERS:**

**Aarschot:** Van Winckel J., Fabriekstraat, 28.  
**Arendonck:** De Troeyer A., Gasthuisstraat, 98.  
**Assche (Brab.):** L. De Rop, Tenberg, 24.  
**Astene:** M. Vanderlinden, Dorp, 54.  
**Diksmuide:** Mackelberg Yserlaan.  
**Gent:** Fino J. Terryn, Raapstraat, 82.  
**Harelbeke:** A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.  
**Mortsel:** H. Van Durme, Eggestraat, 21.  
**Ronse:** G. De Boes, Wijnstraat, 81.  
**Tielt:** R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.  
**Vichte:** G. Faveere, Statiestraat.  
**Wilrijk:** D. Mortelmans, Egied Segerslaan, 14.  
**Woumen (W. Vl.):** H. Verfaillie, Schrevelstraat

## **PARTOPRENU LA VARBKONKURSON DE** **FLANDRA ESPERANTISTO**

**Valorajn libro-premiojn al varbantoj de abonantoj.**  
**Vidu la konkursan regularon en la n<sup>o</sup> 7 de F. E.**

**Partoprenu !!                      Partoprenu !!**

OSTENDO

---

## HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

---

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

## MODERAJ PREZOJ

Sano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

---

### DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

## H. BRAEKEVELT

Statedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj figoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.

## “ BREUGHEL ”

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brusel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)



## Café “Nieuwe Carnot”

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo

---

### LUOTA

1/4 pago: 75 fr. por 12 monatoj;  
50 fr. por 6 monatoj.

1/8 pago: 50 fr. por 12 monatoj;  
30 fr. por 6 monatoj

---

« Presejo de l' Centro », Kipdorpest, 26, Antwerpen.